

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

Jarabono : 60 fkoj

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MARTO - APRILO

1983 - 2

KULTURAJ KAJEROJ

1983 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86000 Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Anĵuoj en Hungario K. Juhàsz

Paĝo de la geknaboj A. Childs-Mee

La profeto (fino) K. Gilbran
trad. S. Boniol

La steloj A. Daudet
trad. A. Ribot

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

ESPERANTO - DOMO

Grésillon, 49150 BAUGE (FRANCIO)

Tel : (41) 89 10 34
ekster la aranĝoj prefere skribu

KULTURAJ ARANĜOJ 1983

SOMERO

PRELEGOJ kaj KURSOJ

alveno Sabaton 2-an de Julio - foriro Vendredon 22-an de Julio

— prelegoj diverstemaj
— kursoj diversnivelaj por internacia ĉeestantaro
— konversacioj
— malkovro de la regiono

DUA LOJRA ESPERANTO-RENDEVUO (23/24 JULIO)

organizita de L.F. KOOP

alveno Vendredon 22-an de Julio - foriro Lundon 25-an de Julio

— studgrupoj por progresantoj, perfektiĝantoj kaj fluaj parolantoj

KURSOJ

alveno Lundon 25-an de Julio - foriro Dimanĉon 7-an de Aŭgusto

— kursoj trinivelaj por internacia ĉeestantaro
— konversacioj - artlaboroj
— malkovro de la regiono

ARTMETIOJ kaj ESPERANTO

alveno Lundon 8-an de Aŭgusto - foriro Dimanĉon 21-an de Aŭgusto

— fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko, kartonlaborado... gvidataj nur en Esperanto
— vizito de la regiono kaj de artmetiistoj

RENKONTO de BLINDULOJ (organizita de FUBE)

ankaŭ malfermita al vidpovaj gesamideanoj

alveno Lundo 22-an de Aŭgusto - foriro Sabaton 3-an de Septembro

— prelegoj, kursoj, distraĵoj

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso

— La ĉi-jara kongresa temo « sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado » estos funde pritraktita, kun amaso de fakaj kunsidoj. Oni ankaŭ faras preparadon por persvadi interesitojn, ekster la movado, kunlabori kaj interesiĝi.

Oni intencas starigi ekspozicion de komunikiloj.

— La scienca eldona centro (S.E.C.) de U.E.A. en Budapeŝto preparas specialajn aranĝojn : renkonto de specialistoj pri faka terminaro, kunsido de la redaktoroj de la Esperanto-fakrevuoj, kunsido pri la evoluigo de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto.

— Ĉiuj aliĝintoj al la Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. en Debrecen (de la 23a ĝis la 30a de Julio), kiuj estas malpli ol 26-jaraj, rajtas aliĝi la universalan kongreson de Budapeŝto pagante kotizon de nur 42 guldenoj.

— Bicikla karavano al Hungario : rendevuo la 11an de Julio en Passau (F.R.G.) por kune iri al la Junulara kongreso. Informiĝu ĉe : Thomas Bormann, Koppel 94, D-2000 Hamburg 1, F.R.G.

Internacia seminario pri Esperanto kaj tekniko

Grava internacia seminario pri la temo : « Aktualaj problemoj de scienca kaj teknika aplikado de Esperanto » okazis de la 7a ĝis la 12a de Decembro, en Bad Saarow (Germana D.R.).

34 fakuloj el 11 landoj pridiskutis 25 prelegojn. Ili adoptis du « konkludarojn » pri : 1. « Aktualaj taskoj pri la disvastigo kaj evoluigo de Esperanto sur fakaj terenoj » ; 2. « Evoluigo de la terminologia laboro ».

La libra merkato

Aperas ke, laŭ la valoro de la venditaj esperantolibroj en la diversaj libro-servoj, Japanio estas la plej granda konsumanto de esperanto-libroj.

Signifoplena faka kunveno : la simpozio « Interkomputo 82 »

Inter la 27a kaj la 30a de Decembro okazis en Budapeŝto « Interkomputo 82 », Internacia Komputoscienca Simpozio kaj Ekspozicio. Partoprenis pli ol ducent fakuloj el 19 landoj de tri kontinentoj.

Venis el Svislando, S-ro I. Uygur por saluti nome de Internacia Telekomunika Unio. La simpozio laboris tri tagojn en dek sekcioj kaj aŭdis 103 fakajn prelegojn.

La dek sekcioj traktis jenajn temojn : « Teorio kaj praktiko de la programado », « Matematiko », « Lingvoscienco », « Instruado », « Aplikoj en industrio », « Mikrokomputiloj », « Agrikulturo », « Medicino, psikologio », « Terminologio » « Administrado ».

Pli ol dudek firmaoj partoprenis en la komputilteknika ekspozicio ; okazis rekta kontakto kun la komputilo de la universitato de Michigan, en Usono.

Okaze de la simpozio, aperis ses volumoj de entute 1.200 paĝoj kun 96 simpoziaj prelegoj, kiuj ankaŭ aperis en la formo de mikrofilma slipo.

La volumoi, jam vendataj en la libroservo de U.E.A., titolas : « Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado » (18 guld.), « Apliko de komputiloj en psikologio, medicino kaj agrikulturo » (9 guld.), « Homa lingvo kaj komputilo » (18 guld.), « Matematiko, instruado de matematiko kai komputotekniko » (18 guld.), « Mikrokomputiloi, periferioi kai aplikoj » (18 guld.), « Teoriaj kaj praktikaj problemoj de la programado » (18 guld.).

Oni planas ke tiu sukcesa aranĝo fariĝu tradicia kaj okazu ĉiun duan jaron. Okazos do « Interkomputo 84 ».

La esperantistoj, specialistoj de informatiko kaj komputeroj povas rilati kun la fako, je la adreso de S-ro Peter Broczko, Pf 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.

Aeronaŭtika fako

Dum la 68a universala kongreso en Budapeŝto, okazos faka seminario pri aeronaŭtiko kaj aviadiko, kun aparta atento pri la koncerna terminologio en Esperanto.

Pli da detaloj aperis en la nova bulteno « Avio ». Informas : S-ro K. Franck, Avio 83, Dukla 2287, Cs 530-02, Pardubice (Ĉekoslovakio).

Esperanto en ĉinaj altlernejoj

La eduka ministerio de Ĉinio sciigis la edukajn departementojn de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando kaj altlernejoj, ke Esperanto povas esti instruata kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj.

Esperanto povas funkcii kiel unu el la oficialaj ekzamenaj objektoj por diplomi studentojn, promocii funkciulojn kaj varbi esploranto-studentojn.

Esperanto-asocio refondita en Ŝanhajo

En novembro, 260 novaj kaj malnovaj esperantistoj ĉeestis la inaŭguran kunvenon de la Ŝanhaja Esperantoasocio.

La fama verkisto kaj esperantisto Bakin estis elektita kiel honora prezidanto. Multaj konatuloj de diversaj rondoj venis.

Zamenhofa Tago en Nov-Jorko...

En Decembro, por la tria fojo, la nov-jorka oficejo de U.E.A. aranĝis Zamenhofan feston.

Antaŭe, en la sama loko, okazis konferenco kun diversaj prelegoj, pri la lingvaj demandoj, aranĝita de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo. Tiu konferenco, kiu kunigis pli ol cent personojn, estis plejparte organizita de la laborgrupo pri Esperanto ĉe U.N.

Tuj poste, okazis en alia salono, akcepto de U.E.A. okaze de la Zamenhofa Tago. Pluraj diplomatoj ĉeestis. La salutparolado estis farita de D-ro William Orr, profesoro ĉe la universitato Hofstra en Nov-Jorko.

... kaj en Ĉinio

Pluraj manifestacioj okazis en Ĉinio, okaze de la 123a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

En Pekino, ĉeestis 160 esperantistoj por parolado kaj arta programo de la ĥoro « Verda stelo ».

En kunveno de Guangdona - a kaj kantona esperanto - asocio venis pli ol 600 personoj. Multaj aliaj grupoj aranĝis tiuokazajn aktivadojn.

Novaĵoj el Sovet-Unio

— La esperanta - rusa vortaro de E.A. Bokarev estis reeldonita en 100.000 ekzempleroj.

— La popularscienca revuo, en rusa lingvo, « Kemio kaj vivo » publikigis esperanto-kurson en 16 lecionoj de B. Kolker, speciale por sciencteknikaj laborantoj.

— Du libroj pri lingvoj por gejunuloj, kiuj lasttempe aperis, dediĉis plurajn paĝojn tre favorajn al la internacia lingvo.

— Lastsomere, okazis apud Moskvo renkontiĝo de blindaj esperantistoj. Pli ol cent personoj ĉeestis.

ANĴUOJ EN HUNGARUJO

Valo de Luaro prezentas luksan historian heredaĵon al la vizitantoj. Famon de dinastio Anĵuo gardas ne nur urbonomo Anĝero, sed ankaŭ la regiono mem. La ŝtonoj ankaŭ nun fieras pri grandeco, riĉeco de reĝoj Anĵuo.

Leganto ! Ek ! Grimpu fortikaĵon de Anĝero ! Rigardu la panoramon ! Ĉu vi aŭdas signalon de la fanfaroj ? Kaj la regiono respondas. La ĉirkaŭantaj vasalo-fortikaĵoj humile fanfaronas superecon de la Dinastio. Sed la fanfaronoj laŭdas ne nur en Francujo, sed ankaŭ en Britlando, en Napolo Reĝlando kaj eĉ oriente en Hungarlando. Tiu ĉi artikolo temas pri la lasta, pri historio de hungara branĉo de la Anĵuo-dinastio.

Historiaj antaŭaĵoj

La hungaraj triboj formis en 1 000 kristanan reĝlandon kaj ekregis dinastio Arpad. Dum 300 jaroj — kvankam okazis ankaŭ pereaj atakoj (tatara, germana invadoj k.s.) — tamen la lando gardis la ekziston, sendependecon kaj eĉ iome evoluis. Fine ĝi iĝis stabila kolono de feŭdismo kaj kristanismo. La Eŭropa politiko akceptis Hungarujon jam renoma reĝlando. Tiu ĉi politiko rezultis viglan komercadon de varoj, se ne paroli pri « komercado gereĝidoj ». Dum 300 jaroj la Arpad-dinastio havis bo-parencojn tut-Eŭrope. Aliflanke multe da dinastioj provis akiri hungarajn teritoriojn pere de geedziĝo, — vane. Mi mencias pretendon de Napolaj Anĵuoj. Tamen tio realiĝis post formorto de la hungara reĝodinastio.

Jen la historio. Reĝidino Maria (filino de hungara reĝo Stefano La Kvina) edziniĝis al Karlo La Dua (La Lama), reĝo de Sicilio. Ilia ido Karlo Martell edziĝis al Klemencia Habsburg (filino de cezaro Rudolfo). El tiu geedziĝo naskiĝis Karlo Roberto (1288-1342) baldaŭa reĝo de Hungarujo. En 1301 la Arpad-dinastio formortis abrupte.

Mortis la reĝo, vivu la reĝo, — sed kiu do estu ? !

Tiu ĉi senekzempla, tute nova demando kaŭzis malkonkordon inter la hungarlanda nobelaro. Ili konsentis nur en tio, ke « la nova reĝo povas esti nur tiu, en kies vejno fluas iom da Arpad-sango ». Tiu ĉi verdikto faris nenion, ja kiu reĝido kristana en tuta Eŭropo ne povus prezenti hungarajn praulojn ? La malkonkordo tuj kaŭzis oligarkion. La nobelaro disiĝis je diversaj partoj. Mi mencias aparte la enlandajn « etreĝojn » : familio Németùjvàr (apogantoj de Otto, posedantoj de Okcident-Hungarujo), Csàk (ĉak) (en nuntempa Slovakio), Amàdé, Apor (reganto de Transsilvanio, gardanto de la krono), Borsa, k.s. Eksterlandaj aspirantoj gravaj estis triope : la ĉeĥa Venceslao, la bavara Otto kaj Karlo Roberto el Napolo. La lasta estis la plej freŝa, jam en 1300 li venis en Dalmatlandon por esti en pli favora situo. Kiel 12 jara reĝido, li vigle interesiĝis pri la hungarlandaj okazintaĵoj. Post unu jaro malpleniĝis la hungara trono. Li jam havas kelke da hungaraj amikoj, tial li abrupte prenas la okazon, kaj li estis kronita en Esztergom (religia rezidurbo proksime de Budapesto). Li eĉ ne konjektis, ke tiu procedo ofte ripetiĝos. Plejmulto de la hungaroj rifuzis la ceremonion, ĉar tio okazis ne per la origina krono, due ne okazis en la kronad-urbo Székesfehérvàr, trie la landparlamento « forgesis jesi ». Dume episkopa kaj magnata delegacio iris al ĉeĥa reĝo Venceslao La Dua por rekomendi la hungaran tronon. La maljuna reĝo rifuzis ĝin, sed akceptis por la filo Venceslao La Tria, kiu poste estis kronita en Székesfehérvàr per la origina sankta krono.

Spite la fiaskojn, alianca aro de Karlo Roberto pli kaj pli kreskis. Inter ili papo Bonifaco La Oka estis la plej influkapabla. Rezulte en 1305 Venceslao abdikis por la bono de Otto bavara princo. La princo kun la sankta krono, — kaŝe, kiel komercisto — alvenis Hungarion kaj baldaŭ ankaŭ li koniĝis. Sed li ne akiris potencon, oligarko Apor enkarcerigas la reĝon kiu por savi la vivon abdikas la tronon. Finfine elĉerpiĝis la eksterlandaj reĝrivaloj, sed restis la enlandaj oligarkoj. En 1307 la parlamento jesas, sekvis do periodo de ruza politiko. En 1309-1306-1315 okazis denove nekonsiderita kronado en reĝa Buda (unu el la fondaj urboj de Budapesto), finfine denove en urbo Székesfehérvàr kun la sankta krono en 1310-08-20. Sed potenco de Karlo Roberto ne estis firma. En 1312 ĉe Rozgony li batalis sukcese kontraŭ Amadé-Gsak oligarkoj. Poste li sukcese evitis atencon de Felician Zach. Por karakterizi la situon jen strofo de balado verkita de Arany (mia krudtradukaĵo) :

(La venĝo :) ... por la montrofingro
lian belan fraŭlinon,
por la dikfingro
teruran morton
de lia fraŭlo,
por la aliaj du (fingroj)
finon de liaj
bofilo, ties filino,
por mia forfluanta sango
la tutan idaron.

Temas pri reĝa tagmanĝo, kiam Zach (zaĉ) abrupte svingbatas al la reĝa kapo, sed dume la reĝino — por defendi la reĝon — metis sian manon super la reĝon. La glavo nur la 4 fingrojn fortranĉis. Poste okazis terura venĝo. Tiu kruelaĵo difektis gajon de ĉiuj rivaloj, restis unusola potenca reĝo.

Karlo Roberto havis tri edzinojn laŭvice : Katerina Maria, Beatrica kaj fine Elizabeta (filino de Ulaslo Lokietek, pola reĝo), kiu naskis du idojn : Ludovikon kaj Andreon. La lasta kaj pli juna baldaŭ edziĝis al Johana reĝino de Napolo. Privata vivo de Karlo Roberto prezentas la koncepton de sia regado : pligrandigi la familian potencon. Tial li helpas sian bofraton Kazimiron por akiri la polan tronon. En 1339 reĝido Ludoviko jam ne nur hungara, sed ankaŭ pola reĝheredanto estis.

Nova balailo bone balaas

Jam la firma trono ebligis la enlandajn reformojn. Anstataŭ la malnovaj oligarkoj li edukis novajn aristokratojn. Ŝanĝiĝis ankaŭ la armeo laŭ banderiala (nobela taĉmento) sistemo. Li forte apogis la urbojn, komercadon, industrion, minejojn. La reĝo famiĝis pri la nova ormono. Kvankam la kortego estis tipe religiema kaj kavaliere morala, tamen maloftiĝis la t.n. diojuĝadoj. En 1335 li fondis la pra-« Interhelpon », kune kun la ĉeĥa kaj pola reĝoj li kontraktis por defendi la komunajn interesojn kontraŭ Vieno, kiu ja havis var-stopan rajton.

Ĉu Ludoviko estis vere granda ?

Ludoviko (1326-1382) ekregis en 1342 heredanta stabilan tronon. La historiistoj nomis lin La Granda. Ĉu li estis inda kunulo de Petro (la rusa), Frederiko (la prusa), k.s. Ludoviko ne deflankiĝas pri vojo de la patro. Pluevoluas la agrikulturo (oni ekuzis la ferplugilojn), metiejoj, urboj. En 1367 li fondis la unuan hungaran universitaton en Pécs (peĉ). La artoj respegulas fidele la epokon : la skulptaĵo Sankta Georgo, La Drakmortanto ; Arany : ...la reĝo bona ... La komercadon vigligas saksaj enmigrantoj (regiono Szepesség ĉe piedoj de Altaj Tatroj). Tamen la grandeco aludas la akiritajn landojn. Jen la plej granda hungara ŝovinismo : 3 maroj ondadis limojn de Hungarujo. Vere li regis inter Baltiko, Adriatiko kaj Maro Nigra. Vidu la mapon ! Jen Pollando, Slovakio, Hungario, Rumanio, Bulgario, Jugoslavio, Ukrajno parte aŭ tute. Krome li aranĝis du militirojn venĝajn kontraŭ Napolo, sed post la hejmenveno Napolo ĉiam iĝis denove sendependa. Li tute ne rekonis la anonciĝontan turkan danĝeron, do li nur konkeris la Balkanajn kaj Adriatikajn landetoin por disvastigi la kristanismon. Laŭ mia takso li regis en 850 mil kvadratkilometroj.

Ĉu estis kontakto hungara-franca ?

Jes, nepre estis precipe komerca kaj religia. Krome Maurice Druon mencias en sia libro : La malbenitaj reĝoj (Les rois maudits) neoficialan militireton por apogi Giovanni di Francio-n aŭ Johanon La Pustumusan, sed la hungaroj ne emis aventuradi, forlasis lin en Italio. Kvazaŭ ili estus sentinta la teruran centjaran militon.

Kiam mortis Ludoviko La Granda la konkeraj militoj jam malplenigis la trezoreion. Restis du filinoj : Maria heredis Hungarujon (kune kun la edzo Sigmundo Luxembourg), Hedviga Polujon (edzo : Ulaslo Jagello). Sed tie mi finas la skribadon, ĉar daŭrigi la historion estus malinda al la glora Anĵuepoko. Kvankam aperis Karlo La Dua (La Malgranda) el la Anĵuo-Napola branĉo, praktike kun Maria finiĝis la Anĵudinastio en Hungarujo, ĉar sekvis periodo de Jagello-dinastio.

Turisto, malkovranta en iu ajn loko ruinaĵojn de Anĵuoj, rememoru ankaŭ pri glorecoj de hungarlandaj Anĵuoj !

Karlo JUHASZ.

Paĝo de la geknaboj

La Kastora Klubo de Esperanto


La Kastora Klubo de Esperanto estas internacia klubo por infanoj, kiuj scias aŭ lernas Esperanton. Ĝin fondis, antaŭ multaj, multaj jaroj, s-ro John Sullivan (Ĝon Salivn), de Britio. Oni nomas lin la ' Ĉefa Kastoro '. En novembro 1982 la Ĉefa Kastoro ricevis unikan honoron : li ricevis la ordenon, ' RIDET-ORDENO '. Ĉi tiun ordenon ricevas homoj kiuj plej ridetigas infanojn. Ĝi estas unika, ĉar la infanoj mem decidas, kiu ĝin ricevos.



Informojn pri la Kastora Klubo vi povas havi de :

S-ino Barbara Chmielewska,
Kastora Klubo,
Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco,
Junulara Kulturdomo,
ul. Deotymy 37,
PL-01-441 Warszawa,
Pollando.

Se vi sendos, kun via informpeto, unu internacian respond-kuponon, vi helpos la agadojn de la Klubo.



KOALOJ ELMIGRAS

Ĉiuj amas la aŭstralian koalon. Sed preskaŭ ĉiuj kiuj deziras vidi ĝin devas viziti Aŭstralion. Kial ? Ĉar ĝi manĝas foliojn de la eŭkaliptoj, kaj nenion alian. Unu besto-ĝardeno en Usono kultivas eŭkaliptojn kaj nun havas koalojn. La klimato tie ankaŭ estas bona por la koalo.




En Japanio, kelkaj japanoj kreis societon : La Koalo kaj Eŭkalipta Asocio de Civitanoj de Jokohamo. Ili jam plantis eŭkaliptojn, kaj nun vizitas Toowoomba-on (Tuŭum-ba) en la aŭstralia ŝtato, Kvinslando, kie estas granda kolonio de koaloj. La japanoj volas scii ĉion pri la amindaj bestoj, ĉar ili esperas iaman permeson fondi koalon kolonion en Japanio.

ONKLINO Jean (Ĝin), Aŭstralio.










MIA BILDO-LIBRO

Mi havas belan bildo-libron
kun brile buntaj paĝoj
kaj tre ekscitaj rakontetoj
pri homoj kaj vojaĝoj,
desegnoj por kolorigado
kaj eble dek poemoj,
krucvort-enigmoj, labirintoj
kaj ludoj kaj problemoj.
Sur la kovrilo estas drako
kun longa fajra lango,
kaj batalprete staras knabo
kun ĉiovenka stango.
La dorskovrilo montras palmojn
kaj ŝipon sur laguno
kaj knabineton en kanuo
sub pacifika luno.
Mi amas mian bildo-libron -
donacis ĝin onklino ;
ĝi min katenas de komenco
ĝis nervo-streĉa fino.

Bertram Potts





Kiom da Esperanto-vortoj
vi povas fari per la literoj
de "Kulturaj kajeroj"?








LA PROFETO (eltirajoj) (fino)

Vi parolas, kiam vi ne plu paciĝas kun viaj pensoj kaj kiam vi ne plu povas daŭre staradi ĉe via soleca koro vi vivas en viaj lipoj kaj la sonoro estas distrilo kaj tempopasigilo. Tamen grandparte en viaj paroladoj la penso estas duonmortigita ĉar la penso estas spaca birdo, kiu en kaĝo el paroloj povas malfermi la flugilojn, sed ne ekflugi. Kelkiuj inter vi priserĉas la babilemulojn timante solecadi. Soleca silentado malkovras al ilia rigardo la memon en ĝia nudeco kaj ili volus fuĝi for. Kelkiuj parolas kaj sen scikono aŭ intenco malkaŝas veron, kiun ili mem ne komprenas. Kelkiuj enhavas la veron ene de si sed ne per paroloj ĝin eldiras. En la sino de ĉi lastaj la spirito restadas en la ritmo de silentado.

Pri la bono, kiu kuŝas en vi mi povas paroli, sed pri la malbono ne, ĉar kio do estas la malbono, krom la bono de sia propra malsato kaj soifo turmentata ? Verdire kiam la bono malsategas eĉ en noktaj keloj ĝi serĉadas sian nutraĵon kaj kiam ĝi soifegas eĉ per morta akvo ĝi sensoifiĝas.



... ĉiuj viaj horoj estas flugiloj traspace plusbatantaj de iu mio al alia mio...

Bonaj vi estas, kiam vi estas en konsento kun vi mem. Tamen kiam vi ne estas en konsento kun vi mem malbonaj vi ne estas, ĉar malkonsenta domanaro ne estas ŝtelista rifuĝejo : nur malkonsenta domanaro ĝi estas. Kaj senrudra veturŝipo povas vagadi sencele tra inter la rifoj tamen nesinkante.

Bonaj vi estas, kiam el vi mem vi provas donadi. Tamen malbonaj vi ne estas, kiam vi strebas al lukro por vi mem. Ĉar kiam vi strebas al lukro vi estas nur radiko, kiu alligiĝas al la tero kaj sin nutras el ĝia sino. Kompreneble la frukto ne povas diri al la radiko : « Estu kiel mi matura kaj plena kaj el via pleneco konstante disdonanta », ĉar ĉe la frukto doni estas bezono, samkiel ricevi ĉe la radiko estas bezono

Bonaj vi estas, kiam plenvekaj en viaj paroloj. Tamen ne malbonaj vi estas, kiam vi dormas kaj via lango stumblas. Kaj eĉ balbutanta parolfluo povas fortikigi malfortan langon.

Bonaj vi estas, kiam vi firme kaj per senhezitaj piedoj alpaŝas rekte al via celo. Tamen ne malbonaj vi estas, kiam lame tien vi iras : eĉ la lamantoj ne retroiras. Sed vi la fortikuloj kaj rapidpaŝantoj atentu ne lami antaŭ la kripluloj pro erariga favorkoreco.


Bonaj vi estas laŭ vojoj sennombraj kaj nepre malbonaj vi ne estas, kiam bonai vi ne estas : vi nur gapas kai pigras. Ja domaĝe, ke la cervoj ne povu lernigi la rapidiron al la testudoj ! En via sopirado al via supera egoo kuŝas via boneco kaj sopirado tiaspeca enestas en ĉiuj vi. Sed en kelkiuj ĝi estas torento, kiu kurimpetas al la maro forportante la montetain sekretojn kaj arbarain kantoin kaj en aliuj ĝi estas malvigla nediligenta rojo, kiu perdiĝas laŭ meandroj kai kurbiĝas kaj malfruiĝas antaŭ ol atingi la bordon.

Sed tiu, kies prisopirado ardegas ne diru al tiu, kies deziro malvarmetas : « Kial vi malrapidas kaj maldiligentas ? ». Ĉar la bonuloj ne demandas la nudulon : « Kie estas via vestaĵo ? » kaj la senhejmulon : « Kie estas via domo ? ».

Vi preĝadas en via angorego kaj bezono. Klopodu ankaŭ preĝadi en via ĝojopleneco kaj tempe de via multhaveco, ĉar kio do estas preĝado la manifestado de via esto en la viva eterno ? Kaj se por via senpeziĝo vi elversas vian malhelon en la spacon, ankaŭ por via ĝuego vi eligas la matenkrepuskon de via koro. Kaj se vi kapablas nur ploradi, kiam via animo vin voktiras al preĝado, ĝi devus vin spronadi plue kaj plue spite de la plorinklino ĝis vi sukcesos ridi. Kiam vi preĝas vi levas vin por renkonti enaere la kunpreĝantojn ĉi horajn, kiujn krom dumpreĝe vi ne povus atingi. Pro tio via vizito al tiu nevidebla templo estu nur por ekstazo kaj milda kununuiĝo. Ĉar se vi envenas la templon nur insiste petonte neniel vi ricevos ; kaj se vi ĝin envenos humiliĝonte vi ne estos levataj ; eĉ se vi envenos ĝin alies feliĉon petegonte vi ne estos aŭskultataj. Jam sufiĉas, ke vi envenas la nevideblan templon. Lernigi al vi pervortan preĝon mi ne povas : viajn vortojn Dio ne aŭskultas, krom kiam la lipoj viaj ilin alparolas Li. Kaj lernigi al vi la preĝojn de la maroj kaj arbaroj kaj montoj mi ne povas, sed vi, kiujn naskis la maroj kaj arbaroj kaj montoj povas en viaj koroj trovi iliajn preĝojn. Kaj se vi nur aŭskultos en la nokta kvieto vi aŭdos ilin ensilente dirantajn : « Dio nia, kiu estas nia flugilhava mio, en ni volas la volo via ; en ni deziras la deziro via ; en ni volus la impeto via aliigi niajn noktojn, kiuj estas viaj je tagoj, kiuj ankaŭ estas viaj. Nenion ajn ni povas peti de vi ĉar niajn bezonojn konas vi antaŭ ol ili estiĝis ene de ni. Vi estas nia bezono ; kaj oferdonante al ni pli da Vi, ĉion Vi oferdonas ».

Ĉu religio ne estas ĉiu ajn ago ĉiu ajn pripenso ? Kaj kio estas nek ago, nek pripenso, sed ekmiro kaj supriziĝo enanime konstante estiĝantaj eĉ dum la manoj dishakas la ŝtonon kaj muntas la teksilon ? Kiu povas disigi sian dogmaron disde sia agado aŭ sian kredon disde siaj okupoj ? Kiu povas etendi siajn vivhorojn antaŭ sin dirante : « Jen por Dio kaj jen por mi mem ; jen por mia animo kaj por mia korpo ». Ĉiuj viaj horoj estas flugiloj traspace pulsbatantaj de iu mio al alia mio. Kiu surportas sian bonmorecon nur kiel sian plej bonsidan vestaĵon, pli bone por tiu ĉi, ke li estu nuda. La vento kaj suno ne truigos lian haŭton.

Kaj kiu alĝustigas sian konduton laŭ etika kodo, tiu malliberigas sian kantistan birdon enkaĝe. La kantado plej libera ne transpasas stangetojn kaj dratojn. Kaj kiu konsideras adoradon kiel fenestron malfermendan sed ankaŭ fermendan, tiu ankoraŭ ne vizitis la hejmolokon de sia



La vento kaj suno ne truigas lian haŭton.

animo, kies fenestroj estas malfermataj de matenruĝo al matenruĝo. Via ĉiutaga vivo : jen viaj templo kaj religio. Kiam vi eniras en ĝin, vian entutaĵon kunprenu : la plugilon kaj la forĝilaron kunprenu, kaj la maleon kaj la liuton, la aĵojn, kiujn vi modelis pro malhavo aŭ por via ĝuo, ĉar enreve vi povas nek vin levi super viajn plenumitaĵojn nek defali pli malsupren, ol viaj malsukcesoj. Kaj ĉiujn ajn homojn ankaŭ kunprenu ĉar dumadore vi povas nek superflugi iliajn esperojn nek malleviĝi pli malalten ol ilia malespero. Kaj se vi volas koni Dion ne zorgu pri enigmosolvado. Prefere ĉirkaŭrigardu kaj vi vidos Lin kun viaj etuloj kunludantan. Kaj trarigardu en la spacon : vi vidos Lin tranube paŝantan, la brakojn enfulme etendantan kaj enpluve desuprantan. Vi vidos Lin en la floroj ridetantan kaj ekstarantan kaj la manojn en la arboj movantan.



La strigo, kies okuloj por nokte ekipitaj estas tagblindaj, ne povas senvualigi la misteron pri lumo.

La sekreton pri morto vi sciavidas, sed per kia rimedo vi povos ĝin atingi krom traserĉante ĝin en la koro de la vivo ? La strigo, kies okuloj pornokte ekipitaj estas tagblindaj ne povas senvualigi la misteron pri lumo.

Kaj se vi volas ververe kontempli la spiriton de la morto larĝe malfermadu vian koron al la korpo de la vivo. Ĉar ununuraj estas ambaŭ vivo kaj morto, samkiel ununuraj estas ambaŭ oceano kaj rivero. En la profundo de viaj esperoj kaj deziroj kuŝas via muta scikono pri la transo kaj, kiel grajnoj subneĝe sonĝantaj via koro sonĝas je printempo. La sonĝojn fidu ĉar ene de ili estas kaŝita la pordo al la eterno. Via timo pri morto estas nur la ektremo de la paŝtisto, kiam li staras antaŭ la reĝo, kies mano estas lin ektuŝonta honorocele. Ĉu la paŝtisto ne ekĝojas dumtreme pro tio, ke li estas baldaŭ surportonta la reĝan insignon ? Tamen ĉu ne pliiĝas lia tremkonscio ? Ĉar kio estas morti, krom staradi nuda envente kaj fandiĝi ensune ? Kaj kio estas ĉesi spiradi, krom forliberigi la maltrankvilan flus-malfluson, por ke ĝi povu leviĝi kaj ŝveli kaj priserĉi Dion sen baroj ?

Nur kiam vi estos trinkantaj el la rivero de silentado vi ververe kantos ; kai kiam vi estos atingintaj la montan verticon finfine vi eksupremiros ; kaj kiam la tero postulos viajn membrojn, tiam vi estos vere dancantaj.

Kalil GILBRAN.
Tradukis : S. BONIOL.

LA STELOJ

RAKONTO DE PROVENCA PAŜTISTO
DE ALPHONSE DAUDET (ALFONS DODE)

Kiam mi gardadis la bestojn sur la monteto Luberon (lŭbron), mi restis dum sinsekvaj semajnoj nevidante unu vivanton, tute sola sur la paŝtejo kun mia hundo Labri, kaj miaj ŝafoj. De temp'al tempo, ermito de l'Monto Ure (ŭr) promenis apude por kolekti sanïgajn plantojn aŭ mi vidis la nigran vizaĝon de iu karbisto de l'Piémont (piemon) sed ili estis homoj silentemaj, naivaj pro izoleco, kiuj perdis parolemon kaj sciantaj nenion pri la okazaĵoj de la urboj kaj vilaĝoj de l'valo. Sekve, ĉiun duan semajnon, kiam mi aŭdis sur la supren iriga vojeto la sonoriletojn de la mulo de nia farmo, kiu alportis al mi la manĝaĵojn por la sekvantaj tagoj, kaj kiam mi ekvidis iom post iom super la deklivo la vivoplenan kapon de la eta farmoknabo, aŭ la flavruĝan kufon de la maljuna onkiino Norade (norad), mi vere sentis grandan feliĉon. Mi petis la rakontadon de la okazaĵoj en la valo, baptoj kaj geedziĝoj, sed la plej interesa detalo por mi estis pri la filino de miaj gemastroj, nia fraŭlino Stefanjo, la plej bela knabino trovebla dek leŭgojn ĉirkaŭe. Ŝajnigante ne tro grandan intereson, mi demandis ĉu ŝi daŭre frekventas la festojn kaj vesperkunvenojn, ĉu ŝi havas novajn admirantojn ; kaj al tiuj kiuj demandos kial mi, kompatinda paŝtisto de l'montaro, zorgas pri tio, mi respondos, ke mi estis dudekjara, kaj ke tiu Stefanjo estis la plej bela vidaĵo en mia vivo.

Nu, iun dimanĉon, kiam mi atendadis la manĝaĵojn, por la dusemajno, okazis, ke ili alvenis nur tre malfrue. Matene, mi pensis : « Estas tiel pro la meso » ; kaj ĉirkaŭ tagmeze, grava fulmotondro eksplodis kaj mi supozis, ke la mulino ne povis ekiri pro la malbona stato de la vojoj. Fine, ĉirkaŭ la tria, la ĉielo jam plipuriĝis kaj la montaro brilis pro akvo kaj suno ; meze de la gutfalado de la folioj kaj de la superbordiĝo de la ŝvelintaj rojoj, mi aŭdis la sonoriletojn de la mulino, tiel gajaj kaj vigligaj kiel paska kariljono. Sed ne venis la eta farmoknabo, nek onklino Norade kun la besto. Venis... divenu kiu ? ! Nia fraŭlineto, karaj ! ...Nia fraŭlineto mem, rekte sidanta inter la sakoj el vimeno, tute rozkolora pro l'aero de la montoj kaj la plifreŝigo de la fulmotondro.

La knabeto malsanis, onklino Norade feriis ĉe siaj gefiloj. La bela Stefanjo sciigis ĉi ĉion al mi malsupreniĝante de sia mulino, ŝi diris ankaŭ, ke ŝi vojeraris, sed vidante ŝin tiel bele vestita, kun ŝia florrubando, ŝiaj brilaj jupo kaj puntoj, ŝi aspektis pli ĝuste kvazaŭ ŝi haltis ĉe la dancejo ol ŝi serĉis la vojon inter la dornaĵoj. Ho ! Kia ambela kreitaĵo ! Miaj okuloj senlace konsideris ŝin. Verdire neniam antaŭe mi vidis ŝin tiel proksime. Iafoje, vintre, kiam la brutaroj estis revenintaj sur la ebenaĵon, kaj mi alpaŝis al la farmo, vespere, por manĝi, ŝi rapide iris tra la ĉambro preskaŭ neparolante al la servistoj, ĉiam eleganta kaj ete fiera... kaj nun ŝi staras ĉi tie antaŭ mi kaj nur por mi ; ĉu ne sufiĉe por perdi la saĝon ?

Elpreninte la manĝaĵojn el la korbo, Stefanjo komencis rigardi avide ĉion ĉirkaŭ si. Iom levante sian dimanĉan jupon por ne difekti ĝin. ŝi enpaŝis en la bredejon



por vidi la angulon, kie mi tranoktis, la pajlan dormejon kun la ŝaffelo, mian longan pelerinon pendantan de la muro, mian bastonon, mian silikfusilon, ĉio amuzis ŝin.

— Do, vi vivadas ĉi tie, kompatinda paŝtisto ! Verŝajne, vi multe enuas, ĉiam sola. Kion vi faras ? Pri kio vi pensas ?

Mi emis respondi « pri vi, mastrineto » kaj tiel mi ne mensogus ; sed mi sentis tian malkvieton, ke mi ne kapablis elbuŝigi eĉ unu vorton. Supozeble, ŝi rimarkis tion kaj malbonino plezure duobligis mian malkvieton per siaj malicaĵoj.

— Kaj via koramikino, paŝtisto, ĉu ŝi vizitas vin iafoje ? Certe, ŝi estas la Orkaprino aŭ la bela Feino Estérelle (esterel) kiu kuras nur sur la montdeklivoj.

Kaj ŝi mem, dum ŝi parolis, aspektis ja kiel la feino Esterelle pro la bela ridado de sia klinita kapo kaj ŝia emo rapide foriri iamaniere, ke ŝia veno estis nur ekapero.

— Adiaŭ, paŝtisto.

— Saluton ! mastrino.

Kaj jen, ŝi estas for kun la malplenaj korboj.

Kiam ŝi malaperis sur la dekliva vojeto, ŝajnis al mi, ke la ŝtonetoj ruliĝantaj sub la hufoj de la mulino falas sur mian koron. Longe, longe mi aŭdis ilin kaj ĝis la fino de l'tago, mi restis kvazaŭ en dormado, nemoviĝante pro timo, ke mi ĉesigos mian sonĝon. Preskaŭ vespere, kiam la fundo de la valoj ekbluiĝis, kaj la bestoj kunpremiĝis blekante unu apud la alia por eniri en la gardejon, mi aŭdis, ke oni vokas min en la deklivo kaj antaŭ mi ekaperis nia fraŭlineto, ne plu ridema kiel antaŭe, sed tremanta pro malvarmo, timo, malseko. Laŭdire, ĉe la malsupro de la deklivo, ŝi trovis la rivereton Sorgue (sorg) altnivela post pluvo kaj nepre volante trairi, ŝi preskaŭ dronis. Plej terure, tiel malfrue en la nokto, oni ne plu povis esperi reiri al la farmo ; ĉar la travojeton nia fraŭlineto neniam povis trovi tute sola kaj mi ne rajtis forlasi la bestojn. Tiu penso tranokti en la montaro multe turmentis ŝin, precipe pro la maltrankvilo de ŝia familio. Mi klopodis laŭpove kuraĝigi ŝin.

— En julio, la noktoj estas mallongaj, mastrino. ...Nur malagrabla momento...

Rapide mi ekbruligis grandan fajron por sekigi ŝiajn piedojn kaj ŝian robon tute malsekan pro la akvo de la Sorgue. Poste, mi alportis al ŝi lakton, fromaĝon, sed la etulino konsentis nek manĝi nek varmigi sin kaj vidante larmojn en ŝiaj okuloj, ankaŭ mi ekmis plori.

Dume, tute noktiĝis. Ĉe la kulmino de la montoj, postrestis nur polvo de suno, flanke de l'okcidento. Mi deziris, ke nia fraŭlino eniru en la bredejon por ripozi. Etendinte belan kaj tute novan felon sur la freŝa pajlo, mi deziris al ŝi bonan nokton kaj mi eksidis antaŭ la pordo... Antaŭ Dio, mi certigas, ke, malgraŭ la amfebro, kiu ardigis mian sangon, nenia maldeca penso estis en mi, mi nur multe fieris, pensante, ke en angulo de la bredejo, tute proksime de la mirigita brutaro, kiu ŝin rigardis dormi, la filino de miaj gemastroj — same kiel ŝafino pli valora kaj blanka ol la aliaj — ripozas sub mia protekto. Neniam antaŭe, la ĉielo aspektis al mi tiel profunda, kaj la steloj tiel brilegaj. Neatendite, la aĵura pordeto de l'bredejo malfermiĝis kaj ekaperis la bela Stefanjo. Ŝi ne povis dormi. La moviĝantaj brutoj bruigis la pajlon aŭ blekis, sonĝante. Ŝi preferis alproksimiĝi al la fajro. Pro tio, mi metis mian felon sur ŝiajn ŝultrojn, mi plivigligis la flamojn kaj ni restadis sidantaj apude kaj silente. Se vi iam tranoktis subĉiele, vi jam scias, ke je la momento, kiam ni dormas, mistera mondo vekiĝas en soleco kaj silento. ...Tiam la fontoj kantetas pli hele, la lageto montras etajn flamojn. Ĉiuj fantomoj de la montaro promenas libere ; kaj en l'aero nerimarkeblaj tuŝetoj kaj bruoj, kvazaŭ oni aŭdus brancojn kaj herbon kreski. ...Dumtage, vivas la estuloj sed dumnokte vivas la aĵoj. Kiam oni ne kutimas pri tio, oni ektimas, ...Sekve, nia fraŭlino tremetis kaj rifuĝis apud mi ĉe l'plej eta bruo. Unufoje, unu krio longa, melankolia el la lageto kiu brilis pli malalte venis al ni laŭ ondoj. Sammomente, bela falstelo glitis super niaj kapoj kaj samdirekte kazaŭ tiu ĵus aŭdita plendo portus lumon kun si.

— Pri kio temas ? demandis Stefanjo, mallaŭte.

— Animo, kiu eniras en la paradizon, mastrino, kaj mi krucsignis.

Ŝi imitis min kaj restis momenton rigardanta la ĉielon, tute meditema. Poste, ŝi daŭrigis :

— Estas do vere, paŝtisto, ke vi estas sorĉistoj.

— Tute ne, fraŭlino, sed ĉi tie, ni vivadas tute proksime al la steloj kaj scias tion, kio okazas ĉe ili., pli bone ol la homoj de l'ebenaĵo.

Ŝi daŭre rigardadis supren kun sia kapo apogita surmane, kovrita de la felo, kiel juna ĉielpaŝtisto.

— Kiel multaj ili estas ! Kiel belaj ! Neniam antaŭe, mi vidis tiel multajn. Ĉu vi konas iliajn nomojn, paŝtisto ?

— Jes ja ! mastrino ; vidu ! ekzakte super ni, jen la Vojo al Sankta Jakobo (Lakta Vojo) Ĝi iras de Francujo rekte al Hispanio. ...Sankta Jakobo de Galico ĝin estigis por indiki la vojon al la bona Karlomagno kiam li militis kontraŭ la Saracenoj. ...Pli poste, vidu la Ĉaron de l'Animoj (Granda Ursino) kun ĝiaj brilegaj aksingoj. La tri antaŭŝvebantaj steloj estas la Tri Bestoj kaj la tute eta apud la tria estas la Ĉaristo. Ĉu vi rimarkas, ĉirkaŭe, tiun stelpluvon kiu falas teren ? Ĝin konsistigas la animoj, kiujn Dio ne volas enlasi en la ĉielon. Iom pli malalte, jen la Rastilo aŭ la Tri Reĝoj (Oriono). Ĝi estas nia horloĝo. Nur rigardante ĝin, mi scias, ke estas pli ol noktomeze. Iom pli malalte ĉiam suden, brilas Johano de Milano, lumigilo de la astroj (Siriuso). Pri tiu stelo, jen la rakonto de la paŝtistoj : Onidire, iun nokton, Johano de Milano, kun la Tri Reĝoj, kaj la Poussinière (pusinjer) (Plejado) ricevis inviton al la geedziĝa ceremonio de iu stelo amika. La Poussinière, pli urĝema, ekiris unuavice kaj laŭ la alta vojo. Rigardu ĝin tie, en la fundo de l'ĉielo. La Tri Reĝoj elektis pli mallongan vojon kaj retrovis ĝin, sed tiu malvigla Johano de Milano, kiu tro dormis, restis tute malantaŭe kaj tre kolera, ĵetis sian bastonon al ili, por ĉesigi ilian iradon. Pro tio, la Tri Reĝojn oni nomas ankaŭ Bastono de Johano de Milano. ...Sed la plej bela el ĉiuj steloj, mastrino, estas ; la Stelo de l'paŝtisto, kiu nin lumigas je l'ektagiĝo kiam ni elirigas la brutarojn kaj ankaŭ vespere, kiam ni enhejmigas ĝin. ...Ni nomas ĝin ankaŭ Maguelonne (maglon) la bela Maguelonne, kiu kutimas postkuri Petron de Provenco (Saturno), kies edzino ŝi fariĝas ĉiun sepan jaron.

— Ĉu vere, paŝtisto, ekzistas geedziĝoj inter steloj ?

— Jes ja, mastrino.

Kaj dum mi klopodis klarigi al ŝi la ekzaktan naturon de tiuj kuniĝoj, mi sentis ion malvarmetan kaj delikatan tuŝeti mian ŝultron. Ŝia kapo, pezigita de dormemo, apogis sin sur mi kun agrabla susurado de rubandoj, puntoj kaj ondumitaj haroj. Ŝi restis tia, senmova, ĝis la astroj de l'ĉielo paliĝis forpelataj de la revenanta taglumo. Sed mi rigardis ŝin dormanta, iom kortuŝita verdire, sed sankte protektata de tiu bela nokto., kiu disdonas nur belajn pensojn. Ĉirkaŭ ni, la steloj daŭrigis sian silentan rondiradon, tiel obeemaj kiel granda brutaro kaj fojfoje, mi imagis, ke unu el tiuj steloj, la plej delikata, la plej brilanta perdinte sian vojon, venis ripozi sur mian ŝultron, por dormi.

Trad. A. RIBOT.

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	U	N	I	V	E	R	S	A	L	A
II	T	O	M	A	T	■	O	B	U	S
III	I	B	I	S	■	A	C	I	D	O
IV	L	E	T	A	R	G	I	O	■	C
V	E	L	■	L	A	■	E	■	D	I
VI	C	A	R	O	J	■	T	U	R	O
VII	O	R	O	■	D	A	■	L	A	S
VIII	■	O	N	D	I	G	I	■	S	■
IX	A	■	D	O	■	A	R	E	T	O
X	G	R	A	M	A	T	I	K	A	J



Nova problemo

KAŜITAJ VORTOJ (proponitaj de J. Turbillon)

Retrovu la ĉi-subajn nomojn de plantoj en la kadro. La vortoj povas esti skribitaj horizontale, vertikale oblikve, de malsupre supren, de dekstre maldekstren, ktp... Vidu la ekzemplon.

La sama litero povas utili plurfoje.

La neuzitaj literoj donos al vi nomon de komuna arbo en mezvarmaj landoj.

acer'	fab'	kverk'	pir'
ananas'	**fazeol'**	liĉi'	pitang'
betul'	fig'	laktuk'	platan'
biks'	frag'	mang'	rafanet'
brasik'	fung'	mandarin'	sezam'
buks'	grenadil'	nap'	spinac'
cep'	karot'	pamplemus'	terpom'
citron'	kaŝtan'	persik'	tomat'
			tremol'

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
A	S	F	K	R	E	V	K	I	S	R	E	P
B	K	U	C	H	L	A	K	T	U	K	I	E
C	U	N	I	R	A	D	N	A	M	B	I	C
D	B	G	T	P	B	E	T	U	L	R	S	B
E	T	E	R	P	O	M	O	I	E	A	P	T
F	P	T	O	R	A	K	D	K	P	S	I	E
G	M	A	N	G	A	A	F	Ŝ	M	I	N	N
H	S	A	N	A	N	A	T	Ŝ	A	K	A	A
I	E	F	T	E	Z	O	R	I	P	T	C	F
J	Z	T	R	E	M	O	L	E	A	F	I	G
K	A	G	O	A	I	Ĉ	I	L	C	B	I	R
L	M	L	T	A	G	N	P	I	T	A	N	G

GRAMATIKO PER BONHUMORO

KUNMETITA ADJEKTIVO — Pluralo


Ni ripetu :

la adjektivo akordiĝas kun la substantivo
(durada veturilo — duradaj veturiloj)
(kvaretaĝa domo — kvaretaĝaj domoj)
(dektaga restado — dektagaj restadoj)

AL ĉiam montras direkton, movon antaŭen — ĝi **neniam signifas** EN

Ni iros al Grésillon per biciklo —
Ni restos en la kastelo dum tri semajnoj

Ja, vortoj por esprimiĝi



Feliĉe, ke panjo ne aŭdas tiun trifojajn ripetadon de tiu malbela vorto ! Ĉu, kiam la martelo estas pli dika, oni diras pli dikaj vortojn, en plurfojaj ripetado ?

CERBUMU

Ĉiu teksto, sub la bildoj, entenas **tri erarojn**. La korektoj estos en la venonta numero de « Kulturaj Kajeroj ».

Sed viajn proprajn korektojn vi povas sendi al S-ino Guillot, 5, rue René-Blanc, 74100 Annemasse (Francio).

La korektotaj eraroj en la antaŭa numero (« Pluralo de la adjektivoj ») estas la jenaj :


— kiu**j**n, pa**ĉ**jo, plenplena**j**
— diskuta**s**, kla**ĉ**a**s**, neniu**n**
— tiu, sinjoro, **ŝ**telisto

Plulernado



Panjo, kial ci ne volas, ke mi diru la novan vorton, kiu mi lernis dum la dek-minutaj paŭzo en la korto de la lernejo ? Mi certigas al ci : estas tute nova vorto, eĉ paĉjo neniam gin diras.

Rememoroj



Kia bela statuo ! Tamen tiuj unubraka statuoj ĉiam ĝenas min. He ! Maria, memorigu al min, kiam ni eliros el la muzeo, ke mi devas aĉeti kalsonetoj por Roĝero.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brŭcke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (975 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (24 guld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1983, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Depuis quelques jours, Grésillon est branché sur le circuit intercommunal d'eau, ce qui permettra de soulager notre puits en alimentant constamment la cuisine et de temps à autre tout le château. Cela nous permettra aussi de faire face à des pannes éventuelles de courant électrique et de renforcer les possibilités d'arrrosage du jardin. Les travaux n'ont pas posé de problème particulier malgré les nombreuses canalisations qui depuis trente ans sont venues s'ajouter à celles existant déjà. Une petite difficulté s'est présentée en dernière minute : le Syndicat intercommunal avait fait placer pour nous un compteur prévu pour un débit acceptable pour une famille de 6 ou 8 personnes. On dit que les espérantistes de Grésillon forment une grande famille, mais tout de même !...

Un don anonyme important nous a également permis d'installer une machine à laver la vaisselle. De temps à autres, depuis des années, nous pensions à cette amélioration, mais les modèles de machines que nous avions vues dans plusieurs expositions spécialisées ne répondaient pas à nos besoins. Il fallait en effet que ce matériel n'exige qu'un investissement abordable et amortissable malgré son utilisation réduite dans le temps, un encombrement minimum, une dépense acceptable d'énergie et d'eau, très peu d'aménagements. Le hasard a voulu que nous voyions fonctionner un matériel répondant à l'ensemble de nos exigences peu de temps avant que la possibilité de financement nous doit donnée.

En ce qui concerne les stages, tout semble aller normalement. La difficulté administrative qui s'était présentée concernant la rencontre internationale d'enfants est levée, mais il nous faudra nous mettre en règle sur deux ou trois points pour l'an prochain. Le nombre de participants sera moins important que celui de l'on dernier, qui fut exceptionnel grâce à la venue d'un groupe de trente petits Allemands. Cette année, les participants, adultes et enfants, devraient être environ cinquante.

Avant l'été, le château hébergera les Cheminots espérantistes pendant une semaine (2-9 mai), puis une classe d'un C.E.S. de Villefranche-sur-Saône. La première période de juillet s'annonce bien ; le 15 mars, nous étions obligés de refuser des chambres particulières, et le nombre d'inscrits est plus élevé que l'an dernier à la même date. En ce qui concerne les autres périodes, il y a des inscriptions et des demandes de renseignements, mais en général c'est après Pâques que se décident les stagiaires de fin juillet et août.

Je voudrais, au nom de tous, remercier tous ceux et toutes celles qui nous permettent par leur générosité de réaliser des améliorations, qu'il s'agisse des prêts sans intérêt pour le service d'eau ou des dons pré-affectés ou non. Grâce à ces derniers, petits et grands, non seulement le service s'est enrichi d'une machine à laver la vaisselle, mais la quatrième édition de « Por la Pratikantoj » a été rendue possible, ainsi que la plantation d'arbres et d'arbustes nouveaux. Le parc s'enrichira encore l'an prochain puisque de nouveaux dons arrivent au Fonds spécial. D'autre part, le Fonds « Fotokopiilo » a pris de l'ampleur, mais encore de manière insuffisante pour que nous puissions réaliser l'achat prévu. L'un d'entre vous ne pourrait-il pas nous procurer un photocopieur pour papier ordinaire A4, pas trop encombrant, d'occasion bien sûr, mais en bon état de marche ? Merci d'avance.

P. BABIN.

INTER NI

Nun Grésillon ricevas akvon de la ĝenerala interurba tubaro, kio helpos nian puton kaj eĉ anstataŭos ĝin okaze de elektro-paneoj. La laboro ne estis tro malfacila kvankam la subtera reto de tuboj kaj defluiloj estas relative densa. Je la lasta momento, iom da prokrasto ! La Interurba Akvo-Kompanio liveris akvokomputilon taŭgan por familio de 6 aŭ 8 personoj. La esperantistaro estas granda familio sed Tamen !

Grava anonima mondonaco ebligis al ni la aĉetadon de lavmaŝino por la manĝilaro. Ĝis nun (jam de longe ni serĉis) ni ne sukcesis trovi maŝinon, kiu respondus la jenajn postulojn : ne tro alta prezo pro la elspezo kaj ankaŭ pro la amortizo per funkciado nur du-kaj-duonmonata ; minimuma embaraso ; minimuma eluzo de energio kaj akvo ; minimuma instalŝanĝo. Iom incidente ni trovis taŭgan maŝinon kaj hazardo faris, ke tuj poste venis la financa helpilo.

La studperiodoj sin anoncas normale. Pro manko de granda grupo el iu lando (lastan jaron el Germanio venis 30 infanoj) la Printempa Infanrenkonto verŝajne kunvenigos nur kvindekon da ĉeestantoj. En majo okazos unusemajna renkonto de la Francaj Esperantistaj Fervojistoj kaj tuj poste unusemajna studrestado de grupo da liceanoj el Orienta Francio. Jam de la 15-a de marto restas por la unua periodo neniu libera unupersona ĉambro kaj nur malmulte da dupersonaj. Por la aliaj periodoj venis kelkaj aliĝoj kaj informpetoj sed, kiel kutime, la interesoj verŝajne manifestiĝos nur post Pasko.

Ni deziras danki la multajn malavarajn monpruntintojn kaj donacintojn kiuj ebligis plibonigon de la vivo en la kastelo por la ĉeestantoj kaj la servistaro, kaj la plibeligon de la parko. La speciala Fonduso « Arboj » daŭre funkcias kaj denove riĉigos la parkon venontjare. Ankaŭ la Fonduso « Fotokopiilo » iom ampleksiĝis, ĉed ĝi ankoraŭ ne atingis la necesan sumon. Ĉu iu el vi ne povus vendi al ni, brokante, fotokopiilon ankoraŭ bone funkciantan kompreneble, uzantan ordinaran paperon, formato A4 (21 × 29) ?

S'abonner

à Kulturaj Kajeroj

c'est aussi aider

La Maison Culturelle

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

LIBRO-SERVO
(SUITE)

Commander à Jeanine VINCENT — B.P. 54 — 49150 BAUGE
Chèques établis au nom de la MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C,C.P. n° 1485-39 P — NANTES
BANQUE : B.P.B.A. NANTES 58019 02570 9
Prix franco au-dessus 100 frs.

Nos prix sont indicatifs

5 — TEATRO

Amo de Danto Alighieri (La) (Müller) historia dramo	35,00
Fatomaŝino (La) (J Cocteau-trad. Lagrange) Iom parodia prezento de la sorto de Edipo	30,00
Kalva kantistino (la) (Ionesco) absurdioma komedio	18,00
El maskobalo (Baghy)	25,00
Hamleto (Shakespeare) traduko de Newell	28,00
— — — de Zamenhof	25,00
Jolanto (H. Hertz) historia dramo	5,00
Justuloj (La) (A. Camus trad. Lagrange) filozofia dramo	18,00
Mokindaj Preciozulinoj (La) (Molière) satiro kontraŭ afektismo	5,00
Natan la Saĝulo (Lessing) klasika drama poemo	6,00
Sen Eliro (La Respektema p...) — (Sartre) dramoj ekzistadismaj	15,00
Tragedio de l'Homo (J. Madach) alegoria drama poemo	28,00
Virino ĉe la landlimo (M. Boulton) drametoj kaj skeĉoj	25,00
15 komedietoj	18,00

6 — POEZIO

Arĉo (Mattos) sonetoj originale verkitaj	15,00
Cigana romancaro (Garcia Lorca) pure hispana sed universale aklamita	15,00
Dudek kvar sonetoj (L. Labbé) el la renesenca franca literaturo	28,00
Duonvoĉe (Maura) originale verkita	15,00
Ekzilo kaj azilo (Emba) originale verkita	15,00
Elektitaj fabloj de Krilov	50,00
Elektita verkaro (Botev)	20,00
Eta vivo	20,00
Fajro sur mia lango (de Kock) originala poemaro	15,00
Gaja forĝisto (La) (H. Schmidt) humuraj simplaj	12,00
Humoroj (Auld) pri vakuo de la homa vivo	15,00
Aimeroj (de Nerval) dulingva eldono	30,00
Infana raso (la) (Auld) longa originala poemo pri la rolo de la homaro	25,00
Infero (D. Alighieri) ilustrita	55,00
Kalipoeg — estono popola eposo	10,00
Krioj el Mallumo	7,00
Kantoj kaj romancoj (Heine)	40,00
Libro de Amo (P. Peneter) amortema kaj erotika	65,00
Martin Fiero (Hernandez) la eposo de la argentinanoj	45,00
Malmalice (J. Valano)	20,00
Kien la poezio ?	25,00
Modela bukedo (Jost) prozo kaj poemoj	6,00
Ni devas vivi (Walraamoen) kaj Gabrielli	25,00
Norda naturo (H. Dresen) observemo kaj natur-simpatio	16,00
Nova Ezopo (S. Urban) Spritaj originale verkitaj fabloj	16,00
Nur tri koloroj (Urbanova) pasiaj originalaj poemoj	16,00
Poeziaĵoj (J. Tuwim)	6,00
Primico (R. Tagor) kvindek poemoj de la bengala poeto	25,00
Provo alfronti la vivon (Georgiev) originalaĵoj	16,00
Renesanca periodo (La) francaj poemoj de la 16a jarcento — dulingva	45,00
Sen paraŝuto (Thorsen) tradukaĵo kaj originalaĵoj	16,00
Sileziaj kantoj (Bezruĉ)	8,00
Soifo (Tarkony) originala poemaro	20,00
Sub stelo rigida (fra Hamri) traduko de islandaj poemoj	16,00
Sur la vivovojo (A. Logvin) originalaj poemoj	16,00
Trofeoj (La) J.M. de Heredia — la franca parnassismo	30,00
Verdkata testamento (Schwartz) humura poemaro	37,00
Vesperkanto (Adamson) pasiaj originalaj poemoj	16,00
Vivendo (L. Gabrielli) originalaj poemoj	35,00
Vojo kaj vorto (Nogeuira) poemoj originalaj kaj tradukitaj	20,00
Sferoj, fikcia scienco	48,00

7 — FAKOJ DIVERSAJ

ABZ de amo (Hegeler) enciklopedio pri la seksa vivo	70,00
De parizo al Pireneoj (Retot) turismo	5,00
Dolĉa Franclando (Delaire) en rakonta stilo	40,00
El la polvo de la Tero (Rolt) pri agrikulturo	22,00
Gvidlibro tra Parizo (Julieta) kun sugestoj por promenoj	20,00
Homaranismo de L.L. Zamenhof (van Kleef)	7,00
Internacia kuirlibro 500 receptoj el 100 landoj	34,00
Kunprinclando Andoro (la) (Barquer) Ilustrita	10,00
Loire Kasteloj (Retot) turismo	5,00
Nobla Korano (La) plena traduko kun paralela originala araba teksto	160,00
Retoriko (Lapenna) science redaktita	60,00
Sankta Biblio (La) malnova kaj nova testamentoj	135,00
Senĝenaj dialogoj (Fernandez) popularscienca esploro de fundamentaj demandoj	45,00
Skizo pri Ĉinio	12.00
Diroj de Mateo (Freinet)	38,00

8 — DIVERSAĴOJ

Danĝera ul' (J. Le Puil) kasedo kun tekstlibreto	52,00
Elektitaj eroj de N. Rytjkov — disko —	45,00
El la poezio de Baghy — deklamado	16,00
Esperanto kantas Carrouges disko	17,50
—— kasedo	18,00
Instruamuzo (marĉek markovic) 2-a volumo	15,00
Tra l'Mondon (O. Tzaut) disko 30 cm. stereofonia	52,00
—— kasedo	52,00

Le prix de l'abonnement

à « **Kulturaj Kajeroj** »

est modifié

à partir du 1er janvier 1983

et passe à **60 francs** par an

Pour vos lectures
et vos cadeaux de fin d'année

offrez un chef-d'œuvre
de la littérature française
magistralement traduit

NORMANDAJ RAKONTOJ

de **Guy de Maupassant**

Traduit par Roland DUPUIS
Illustré par R. PINCHON

★

Prix : 36 francs
— **Rabais à partir de 3 exemplaires** —

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entrainement à un cours supérieur : versions thèmes, étude de textes.
Cours et corrections : 70,00 F.
Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà. ★

Régler les cours par un chèque à part
C.C.P. : 1485 39 P Nantes

Les extraits de notre catalogue

En 1961 a paru la traduction en françaisdu livre

PRINTEMPO en la AŬTUNO

de Julio Baghy

Les exemplaires restants ont été mis à notre disposition par la traductrice Irène Marsy.

Prix de l'exemplaire : **15 francs**

Les sommes recueillies serviront à abonner à « Kulturaj Kajeroj » des espérantistes du Tiers-Monde.